

LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF

Inventinto de Esperanto

Manuskripto de John Hornby Desegnita de Colin Andreo

LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF NASKIĜIS EN BJALISTOKO, LA 15-AN DE DECEMBRO 1859. LIA PATRO ESTIS INSTRUISTO KAJ EN 1873 LA FAMILIO TRANSLOĜIĜIS AL VARSOVIO KIE LUDOVIKO DAŬRIGIS SIAN INSTRUADON. SED ANTAŬ OL LI FORLASIS SIAN NASKIĜLOKON LI DEVIS VIDI SCENON KIUN LI NENIAM FORGESOS…

KIEL STUDENTO EN VARSOVIO, ZAMENHOF PRIPENSIS LA PROBLEMON EBLIGI HOMOJN PAROLANTAJN MALSAMAJN LINGVOJN KOMPRENI UNU LA ALIAN. LA RESPONDO ESTIS, KE ILI DEVUS PAROLI DULINGVOJN: SIAN GEPATRAN LINGVON KAJ UNU KIUN ĈIU POVUS KOMPRENI - MONDLINGVON





LI SUBITE EKKOMPRENIS, KE PER KUNMETADO DE LA SAMAJ PREFIKSOJ KAJ FINAĴOJ AL VORTOJ ELPRENITAJ DE MULTAJ LINGVOJ, FACILE LERNEBLA LINGVO POVUS ESTI KONSTRUITA. NENIU POVUS ĴALUZI PRO ĜI, ĈAR ĜI APARTENUS AL NENIU NACIO – ĜI APARTENAS AL ĈIUJ HOMOJ. KAJ TIEL ESPERANTO ESTIS NASKITA.

LIA ENTUZIASMO INFEKTIS SIAJN KAMARADOJN STUDENTOJN…

… LA TOT’ HOMOZE IN FAMILJE KUNUNIGARE SO DEBÁ*
JE LA 5-A DE DECEMBRO 1878, ZAMENHOF KAJ SIAJ AMIKOJ FESTIS LA NASKIĜON DE LA MONDLINGVO. ILI KANTIS EN ESPERANTO LA HIMNON DE FRATECO.
…LA TUTA HOMARO EN UNU FAMILIO DEVAS UNUIGI SIN.

Sed la lingvo de Zamenhof estas granda aĵo…
Ridinda!
Tute nepraktika.
ESPERANTO ESTAS MOKITA KAJ LA AMIKOJ DE ZAMENHOF MALKURAĜIĜIS. …

Via filo malŝparas sian tempon, S-ro Zamenhof.
Via devo estas klara, sinjoro.

Vi devas rezigni je tiu lingvo, Ludoviko, kaj koncentriĝi je lernado de profesio. Mi ordonas tion al vi!
Mi devas obei vin, patro. Mi promesas


KAJ TIEL ZAMENHOF FLANKEN METIS SIAN LABORAĴON POR STUDI MEDICINON.

ĈN MOSKVO LA JUNA STUDENTO EKHAVIS SIAN MALGRANDEGAN POŜMONON PER SKRIBADO.

ZAMENHOF REVENIS DE MOSKVO...
Hejme denove! Kiel feliĉe ili estos vidante min!

Kio estas malĝusta, panjo?

Via paĉjo… bruligis viajn manuskriptojn…
Mi devas vidi lin!



ZAMENHOF AKIRIS SIAN DOKTORECON, POSTE LI IRIS AL VIENO POR PLUA TREJNADO. REVENANTE AL VARSOVIO LI KOMENCIS PRAKTIKI KIEL OKULISTO. SED LI DAŬRE EVOLUIGIS ESPERANTON.

Fraŭlino-Silbernik…
D-ro. Zamenhof…
ZAMENHOF RENKONTIS LA KNABINON KUN KIU LI ESTIS EDZIĜONTA. ŜI PETAS AL LI RENKONTI ŜIAN PATRON.

Vi estas geniulo, Ludoviko! Mi presos vian verkon!

Via lingvo igos vin riĉa!
Tio eventuale alportos al vi milionojn.
Mi ne prenos monon por ĝi… ĝi estas mia donaco al la ideo de homa frateco.

ZAMENHOF, NUN GEEDZIĜINTA, DISSENDAS SIAN LIBRON CELANTE DISVASTIGI LA SCION PRI ESPERANTO. KIEL ĜI ESTOS AKCEPTITA?

Homoj ŝatas Esperanton! Ili deziras lerni ĝin!
Kaj daŭre pli da leteroj venas.

Kion vi opinias pri Esperanto?
ONI DEMANDIS AL TOLSTOJ, LA PLEJ GRANDA VERKISTO DE RUSIO OPINION PRI ESPERANTO. LIA ALTA LAŬDO HELPIS DISVASTIGI LA MOVADON. POSTE...

LA BATO ESTIS SEVERA, SED EKSTERLANDE LA MOVADO DISVOLVIĜIS LIBERE; DUME ZAMENHOF DAŬRIGIS SIAN LABORON…



ZAMENHOF KAJ LIA EDZINO POVAS APENAŬ HAVIGI AL SI LA RIMEDOJN POR AĈETI LA BILETOJN. SED ILI IRIS…



…AL BOULOGNE

ZAMENHOF ESTAS RICEVANTA MIRINDAN OVACION

ZAMENHOF KONSTATAS, KE ESPERANTISTOJ NE PLENUMAS SIAN CELON SE ILI NE PREDIKAS INTERNACIAN FRATECON.



EN AŬGUSTO 1914, LI IRIS AL FRANCIO POR EMFAZI TIUN PUNKTON.

DR. ZAMENHOF HEJMEN IRIS ROMPITA HOMO. MILITO ESTAS DETRUANTA FRATECON.



DR. ZAMENHOF MORTIS JE LA 14-A DE APRILO 1917. MILITO MALPERMESIS LA ESPERANTISTOJN DE LA MONDO HONORI LIN. TAMEN LIAJ MALRIĈAJ PACIENTOJ FARIS SIAN LASTAN VIZITON.

ESPERANTO PROSPERAS KAJ EN 1959, MILIONO DA SUBSKRIBOJ REPREZENTANTAJ PLI OL 15 MILIONOJ HOMOJ PETIS LA U.N. POR REKONI LA MONDLINGVON. UNESKO FARAS TION KAJ KVANKAM D-RO ZAMENHOF ESTAS MORTINTA, ESPERANTO VIVAS KAJ DISVOLVIĜAS...